

Senpartieco kaj egaleco inter homa specio en Malio

La socia kaj kultura konstruado inter viroj kaj virinoj nomiĝas homa specio. Homa specio kaj disvolviĝo estas ekstratado de rilataj problemoj inter viroj kaj virinoj por akiri la kondiĉojn de justa disvolviĝo.

Ĝeneralaj karakterizaĵoj de la homa specio en Malio

Etna grupoj estas dividitaj en hierarkio de nobeluloj, liberaj homoj, kasto kaj sklavo. La graveco de ĉi tiuj sociaj kategorioj en nuntempa malia socio estas kontestita. Ĉiuj aktualaj formoj de socia vivo en Malio, inkluzive de la homa specio sistemo, estas influataj de ĉi tiu hierarkia socia sistemo.

Rilatoj inter viroj kaj virinoj estas kelkfoje streĉaj, ĉar la virino ne povas elekti la vivlokon aŭ la personon kun kiu ŝi volas vivi. La geedziĝon aranĝas la patro kaj la viraj fratoj. Kiam virino ne plu amas sian edzon aŭ ŝian familian situacion, ne ekzistas multe da ebloj se ŝi volas konservi sian respekton, precipe kiam ŝi estas patrino. Do en la plejmulto da kazoj la virino restas en la familio de la edzo kaj estas en malsupera pozicio kaj viktimo de perforto.

Virinoj ne ludas iun ajn rolon en vilaĝa politiko, ne partoprenas renkontiĝojn kaj devas resti hejmen.

Analfabeteco, nesufiĉa sansistemo, salajraj neegalecoj, senlaboreco estas aliaj faktoroj, kiuj malplibonigas seksajn egalecojn.

Distribuo kaj kontrolo de rimedoj

La ideologia sistemo igas virojn kaj virinojn interdependaj unu de la alia. Viroj bezonas virinojn por konfirmi siajn rolojn kiel edzoj kaj patroj. Virinoj ankaŭ bezonas virojn kiel edzojn, patrojn de siaj infanoj. La graveco de la rolo de edzino kaj patrino gravas pli por virinoj ol aliaj roloj kaj identecoj. Por la plejmulto de virinoj, la sola vojo estas edziniĝo kaj patriniĝo.

La socia divido de laboroj kaj la respondeco de ĉiu en la nuntempa kampara socio grandparte baziĝas sur seksa komplementeco. Virinoj en kamparaj regionoj havas plivastigitajn devojn al siaj originaj familioj, precipe kiam familiaj grenejoj estas malplenaj. La persona riĉeco de la virino estas pli uzata por prizorgi la infanojn, dotaĵo de la juna knabino, subteni sian originan familion malutile al siaj propraj bezonoj. La vivo de kamparaj virinoj pleniĝas per hejma kaj agrikultura laboro.

Kutima juro, aliro de virinoj al la tero

La rilato de virinoj kun agrikultura tero reflektas la superecon de kutimaj normoj en nuntempa Malio. Virinoj ne povas havi individuan krediton pro ideologiaj limoj. Analfabeteco estas obstaklo kaj la rajto de virino aliri al la tero varias laŭ la graveco de la kutimaj reguloj de ĉiu regiono. Malpli da knabinoj ol knaboj iras al lernejo. Nur 15% da virinoj scias legi kaj skribi kompare kun 32% da viroj.

Jura stato de maliaj virinoj estas karakterizita per la kunekzistado de modernaj kun kutimaj leĝoj kaj reguloj. Laŭ virinaj aktivulinoj, kutimaj reguloj baziĝas sur la principo de seksa neegaleco, kiu donas al viroj regan

rolon en la familio kaj en socio. Dependeco de virinoj al viraj potencoj havas negativajn konsekvencojn malgraŭ forigo de kutimaj tribunaloj en la 1960-aj jaroj.

Viroj konsideras, ke ili pli respondecas koncerne al la familiaj bezonoj ol virinoj kaj do ili trudas ilian agmanieron. Ĉi tio okazas eĉ se, praktike, virinoj estas la unuaj, kiuj zorgas pri la bezonoj de la familio.

Jura kadro de seksaj rilatoj

Serio de naciaj kaj internaciaj dokumentoj favore al demokratiaj rajtoj de ĉiu individuo kaj al nediskriminacio de ĉiuj civitanoj estis subskribita de la malia registaro. Ĉiuj fundamentaj leĝaj tekstoj kiel la Konstitucio, Laborjuro, Geedzeca kaj Tulela Kodo konfirmas egalecon por ĉiuj sen diskriminacio de raso, sekso, religio kaj etneco, kaj kondiĉas la rajton de ĉiuj al edukado, laboro, ripozo kaj socia helpo.

Malgraŭ ĉio, aplikado de leĝoj ne estas respektata kaj virinoj suferas malsaman juran traktadon ol viroj, precipe koncerne repudion, infanzorgadon kaj heredon.

Geedzeco, eksedziĝo kaj heredo

Geedziĝo estas kontrakto inter genlinioj kaj estas konfirmita per la pago de doto de la genlinio de la edzo por la genlinio de la edzino. Vidviĝinta, virino estas transdonita al iu juna frato de la forpasinta edzo. La edzino estas vidata kiel gasto en la genlinio de la edzo ĝis kiam ŝi naskas infanon. Ŝi ne rajtas posedi en la familio per geedzeco aŭ en sia originala familio. La riĉeco de la edziĝinta virino dependas de tio, kion ŝi mem kapablas amasigi. Laŭ kutimo, virino ĉiam estas kiel sub protekto de la viro kaj estas parto de lia heredaĵo. Vira repudio de la virino estas malpermesita laŭ la familia kodo de 1962a.

Virina partopreno en publika vivo

La publika sfero estas regata de viroj. Pro religiaj aŭ tradiciaj kialoj virinoj restas en la privata sfero. Virinaj asocioj prosperas en Malio kaj estas konsiderataj kiel ina spaco, do hejma, ĉar la kunvenoj okazas en la hejmo de unu el la membroj.

Skribas Madou MAIGA